


La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 3-4/1988

*Post 20 jaroj
denove kongreso
en Sundsvall.*



Kaj ĉiuj ĝuis ĝin!

Kongresa spickuko

Dum la kongresa ekskurso al Galtström la ekskursantoj estis regalitaj per kafo kaj manĝo, kaj per speciala spickuko bakita laŭ malnova recepto.

Tiu recepto estis la saman vesperon unu el la eroj de la atkocio kaj la felicitulo, kiu sukcesis akiri ĝin, estas Ulla Luin. Si malavare disponigas ĝin al ĉiuj egantoj de *La Espero*. Jen ĝi:

[NGREDIENCOJ]

250 g da fluigita margarino
2 dl da kirlita kremo
50 g da ŝutsukero
25 cl da melaso
ĉelo kaj suko de granda citrono
1 kaj duona kulero da muelita
zingibro
1 kaj duona kulero da bikarbo-
nato
1 kg da tritika faruno

Vi povas anstataŭ margarino uzi parte aŭ tute buteron. 400 g da graso (ekzemple 300 g da margarino kaj 100 g da butero) donos al vi pli molajn kukojn (laŭ la baza recepto ili estos tre malmolaj, se vi preferas tiajn).

Fluigu la margariton kaj buteron, aldonu sukeron, melason kaj spicojn (zingibro kaj citrono). Lasu la paston malvarmiĝi.

Aldonu farunon kaj bikarbonaton (ŝparu nur ĉ. 1 – 1,5 dl) kaj la kirlitan kremon. Faru el la pasto globetojn (grandeco de kronmonero), platigu ilin iomete kaj metu sur grasigitan bakplaton. Baku dum 18 – 20 minutoj je 150 gradoj. Tuj forigu de la bakplato.

Bonan sukceson, deziras Asta, kiu bakis la kukojn en Sundsvall kaj disponigis la recepton.

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,
tel. 08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 00 Arboga,
tel. 0589-155 31

Sättning: Per Arne Fritzon

Utformning: Franko Luin

Tryck: EsperantoCentro, Stockholm 1988

Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,
tel. 08-11 74 34

Öppettider: måndag – fredag kl. 10.00 – 14.00; måndag – torsdag även
17.30 – 19; vissa lördagar kl. 10.00 – 12.00.

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift: Direktansluten medlem 100 kr. Familjemedlem (utan
tidning) 50 kr. Ungdomsmedlem 50 kr.

Enbart prenumeration: 100 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 50 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters
Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får
den, meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

SEFs styrelse

Ordförande: Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 00 Arboga,
tel. 0589-155 31 (La Espero, massmedier)

Vice ordförande: Märtha Andréasson, Pl. 2265, 425 00 Hisings Kärra,
tel. 031-57 11 33 (Årskongresser, ekonomifrågor)

Sekreterare: Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö,
tel. 08-712 82 91 (kansliet)

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde,
tel. 0500-12205 (massmedier)

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin, Ringvägen 11B, 579 00 Högsby,
tel. 0491-20461 (turnéer, bibliotek)

Styrelseledamot: Åke Rohdin, Engelbrektsgratan 25A, 702 13 Örebro,
tel. 019-18 53 60 (intern.org.)

Styrelseledamot: Haldor Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping,
tel. 011-16 26 87 (utveckling, intern.org.)

Suppleant: Ingemar Nordin, Mosebacke torg 8, 116 46 Stockholm,
tel. 41 46 37 (kansliet)

Suppleant: Bertil Andreasson, Södra Rörum, 242 00 Hörby,
tel. 0415-501 52 (utbildning, nordiskt samarbete)

Informationskommittén: Bernt Lindquist, Västermovägen 19,
732 00 Arboga, tel. 0589-155 31.

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20B, Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Öppettider: 1 september – 15 maj; onsdagar 10 – 11, torsdagar 17 – 18.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Anita Lindblom.

Enhavo

- 34 Kongresa spickuko
- 35 Ni ĝuis nian tempon en Sundsvall
- 36 114 kongresanoj el 8 landoj kuraĝe venis al Sundsvall
- 38 Nova estrarano, kotizaltiĝo, nova honora membro, loterio
- 39 Jadwiga Gibczynska ludis por emociita publiko
- 40 "Via movado estas vera pacmovado"
- 41 SEJU-jarkunveno
- 41 ILEI-jarkunveno
- 42 Aliĝu al Kultura Esperanto-Festivalo
- 42 Jarraporto del Sveda Esperanto-Instituto
- 43 TRA LA LANDO
Falköping på Esperanto
45 lemantoj en Skövde
Raporto el Sudorienta Regiono
Esperanto en proksimradio en Uppsala
TEDU-träff
Polsk skådespelare på turné
- 45 TRA LA MONDO
Urbestro parolis Esperanton!
Esperanto elsendoj de la Itala Radio
Dankvortoj de Roman Malinowski
Junulara laborbrigado
Docentiĝo de D. Blanke
100-jara klubo
Lernejo pri komputiko
- 46 La medikoboldo Plupo havas propran arbaron
- 47 Kiel skribi artikolon pri Esperanto
- 47 Nekrologoj

Prezidanto:

Ni ĝuis nian tempon en Sundsvall

La postkongresa numero de *La Espero* kutime entenas ĉefe raportojn pri la ĵus okazinta kongreso, kaj tiel estas ankaŭ ĉi-jare.

La finaj vortoj de la stokholma kongreso estis deziro pri sukceso por la LKK en Sundsvall. Kaj estis sukceso. La bone miksitaj programoj, kun laboro, amuzo, ekskursoj kaj prelegoj, estis alte taksitaj. La obstaklojn, kiuj estiĝis, la LKK bone kaj rapide solvis. Por tiuj partoprenantoj, kiuj neniam antaŭe vizitis tiun belan nordan urbon, estis okazo vere rigardi ĝin kaj konatiĝi kun ĝi.

La monodramo "La lastaj infanoj de Oldrovalo", prezentita de Jadwiga Gibczynska, estis travivaĵo, kiun ni dum longa tempo ne forgesos. Estis la monda premiero de tiu teatraĵo, kaj ni estas tre fieraj, ke ĝi okazis en Svedio. Tute alispecan teatron prezentis Torsten Lund, atŭkciante malnovajn Esperantolibrojn.

La membroj en Sundsvall amuzis nin per kantoj kaj ludoj, kaj kreis gajan etoson. Ake Näsholm montrigis vera belkantisto, kaj la teatraĵo de la SEJU-anoj vere gaje surprizis nin.

La temo de la kongreso estis



"Homaj rajtoj", ĉar tiun temon UN elektis por la jaro 1988, okaze de la 40-a datreveno de la akcepto de la Deklaracio de Homaj Rajtoj. Pro tio la prezidanto de la sveda UN-asocio, Karl-Erik Svartberg, estis invitita al nia kongreso, kaj li parolis pri tiu temo. Ni konstatis, ke li fariĝis pli kaj pli favora al Esperanto dum nia diskuto. Ni havas multajn komunajn celojn kaj idealojn, kaj se ni iom post iom konvinkos UN pri la neceso de Esperanto el ekonomia kaj egaleca vidpunkto, ni vere progresos. Kaarlo Voionmaa, finndevana lingvisto, substrekiis la grandan signifon de Esperanto kiel ponto inter diversaj lingvoj.

Kaj ni laboris! Ni diskutis nian laborplanon por la venonta agadperiodo, sed ni ankaŭ diskutis la estontecon laŭ pli longa perspektivo. Ni vere havas laboron antaŭ ni, sed kune ni certe sukcesos!

Konklude: Ni ĝuis nian tempon en Sundsvall.

Karin Lindquist

114 kongresanoj el 8 landoj kuraĝe venis al Sundsvall

Aranĝi svedan Esperanto-kongreson en Nordlando povas doni problemojn. Unue: risko, ke venas tro malmulte da partoprenantoj tiel Norden. Due: tro malagraba vetero por la ekskursoj.

La unua timo montriĝis senprava por la kongreso en Sundsvall pentekoste. Alvenis 114 partoprenantoj – inter ili 26 gajaj kaj agemaj gejunuloj. Gastoj el sep aliaj landoj ankaŭ donis al la kongreso internacian etoson: Norvegio, Finnlando, FR Germanio, Pollando, Greklando, Hungario kaj Tanzanio.

Kaj la dua timo? Fakte dum la ekskursoj ni vidis restantajn neĝo-lokojn en la arbaroj, pluvis, blovis kaj kelkfoje estis nur 6-7 gradoj super nulo – sed poste ni aŭdis, ke la pentekosta vetero ne estis multe pli bona en pli sudaj partoj de Svedio...

Du grandaj eventoj

Denove bone organizita kongreso! Kompreneble – ĉiam niaj LKK-anoj kun granda respondecemo laboregas. La naŭ por ni

nun tre karaj LKK-anoj en Sundsvall vere ne estis esceptoj: Ingrid kaj Åke Näsholm, Gunnar Farm, Anna kaj Mats Landfors, Anna Eriksson, Anna Carlsson, Jarl Henriksson kaj Helene Brännmo meritis la dankajn donacojn, kiujn ili je la fermo ricevis de la SEF-prezidanto. Cetere la tuta klubo bone laboris kaj danke ricevis banderolon.

El multaj kongresaj okazintaĵoj la du plej grandaj estis:

- La vizito de la prezidanto de la sveda UN-asocio (FN-förbundet), parlamentano Karl-Erik Svartberg, lia prelego kaj la diskuto poste.

- La brila, kortuŝa monologo de la pola aktorino Jadwiga Gibczynska, kiu prezentis dramigitajn fragmentojn el la libro "La lastaj infanoj de Oldrovalo".

Malfacile elekti

Jam vendrede vespere estis interkona vespero en la kongresejo, Hotelo Sundsvall. Åke Näsholm kantis Esperanto-kan-

tojn, kiujn li mem verkis respektive tradukis, akompanata per piano de Mats Landfors. Tuj oni rimarkis la bonan etoson de la kongreso.

Sabate matene estis ebleco konatiĝi kun la bela Sundsvall per urbo-rigarda promeno, gvidata de oficistino de la turistoficejo, kies priskribojn Mats Landfors verve tradukis. Sed samtempe okazis la jarkunveno de Eldona Societo – kaj estis malfacile elekti. La kongresa programo tamen estis tiel plena, kvankam ni uzis ĉiujn pentekostajn tagojn, kaj estis neeble eviti kelkajn tiajn konfliktojn.

Amnesty kaj Rotary

La sabata diskuto pri la agadplano estis tamen tro grava por havi konkuranton. El multaj diroj kaj deziroj dum la diskuto, ni povas citi:

Leif Nordenstorm: Kiam vi kontaktas Amnesty-klubojn, atentigu ilin, ke Amnesty-konferenco en Londono nun decidis aldoni Esperanton kiel ĝian kvinan lingvon.

Ulf Ribers: En Rotary esperantistoj havas grandajn ŝancojn propagandi. Multaj Rotary-kluboj havas malfacilaĵojn trovi programerojn. Proponu al ili prelegojn pri Esperanto! Mem mi jam vizitis dekduon da kluboj...

Linnea Edsenius: Oni tamen kelkfoje devas esti ruza. Mi spertis malfacilaĵojn rilate al Rotary – sed kiam mi ŝanĝis la temon al "Internaciaj lingvaj problemoj", ili pli interesiĝis!

Haldo Vedin: Al la kongreso de la sveda UN-asocio ni donis proponon pri Esperanto.

Kelkaj gelnantoj de la Esperanto-kursoj ĉe la popolalt-



La ejoj del Folkets hus bone taŭgis por la diversaj kunvenoj de la kongresantoj en Sundsvall: SEF, Eldona Societo Esperanto, SEJU, ILEI.



SEJU-membroj ne nur kunvenis en Sundsvall, sed ankaŭ aktoris dum unu el la vesperoj

lernejo en Karlskoga laŭdis la iniciaton tie de Lars Forsman, sed ankaŭ metis la demandon, ĉu oni nur investu intereson en unu solan popolaltlernejon.

Kerstin Rohdin: Uzu la turne-prelegantojn ne nur en la kluboj, sed ankaŭ por publikaj kunvenoj. Nova preleganto en oktobro estas preta: la polo Stanislaw Burba, kiu antaŭ kelkaj jaroj ĝuis sukceson en Svedio.

Ulf Ribers denove: Proponu en la bibliotekoj prunton de Esperanto-libroj por vekti la bibliotekistojn!

Denove post 20 jaroj

Ni jam preskaŭ sentis nin meze de la kongreso – sed nur nun okazis la inaŭguro...

Ingrid Näsholm salutis kaj kaj memorigis la kongreson, ke antaŭ precize 20 jaroj ankaŭ estis kongreso en Sundsvall. Mats Landfors per piano ludis "Printempan fanfaron". Koruso de studentoj en muzika lernejo bele kantis, i.a. en Esperanto.

SEF-prezidanto Karin Lindquist bonvenigis ĉiujn, sed precipe parlamentanon Karl-Erik Svartberg, la finnan lingvo-esploriston Kaarlo Voionmaa, la polan aktorinon Jadwiga Gibczynska kaj ŝian traduki-

ston Joachim Giessner. Si ankaŭ substrekis la faktojn, ke nia junulara organizo SEJU 30-jarjubleas, ke la celo de la pasinta jubilea jaro – "ĉiu svedo sci, kio estas Esperanto" – estas pli proksima al realiĝo, kaj ke estas grave atentigi la mondon pri tio, kiel bona solvo estas Esperanto anstataŭ la kostega tradukado ĉe UN kaj aliaj internaciaj organizoj.

Sekvis la parolado de Karl-Erik Svartberg kaj posta diskuto (vidu apartan raporton), kaj la prelego de Kaarlo Voionmaa.

Junula spektaklo en malnova uzino

En la diservo en la Betlehem-preĝejo dimanĉe matene predikis pastro Leif Nordenstorm, kaj kantis kun mirinde bela voĉo Birgitta Eriksson.

La plej grava ero de la kongreso, la jarkunveno de SEF dimanĉe antaŭtagmeze, kompreneble havas propran artikolon.

Vizito en la fama kulturmagazeno donis al la vizitantoj multon. Sed partoprenantoj de la jarkunvenoj de SEJU kaj ILEI ne povis dividi sin...

La anoncita dimanĉa eks-

kurso al arbara bieno Gudmundstjärn pro vojaj obstakloj estis ŝanĝita al alia ekskurso al Galtström, interesa malnova uzino. Inter la multaj vidindaĵoj tie, la gejunula triopo Jarl Henriksson, Viktoria Håkansson kaj Helene Brännmo bele surprizis nin per gaja spektakleto.

Aŭkcio donis 2400 kronojn
Post la vespermanĝo, Torsten Lund en tradicie gaja maniero gvidis la aŭkcion de Esperanto-libroj. La rezulto estis 2400 kronoj! Samtempe ni povas noti, ke Leif Nordenstorm por Eldona Societo vendis por proksimume 3000 kr dum la kongreso. SEF vendis informmaterialon por pli ol 1000 kronoj.

Pri la dimanĉvespera distra programo respondecis la trobadoro Lars Åke Melin, kiu kantis i.a. en Esperanto, kaj grupo de SEJU-anoj kun teatraĵo. Bone la gejunuloj ludis pri la temo internacia konkordo inter ĉiuj mondpartoj.

Norrköping en aprilo 1989

Ankaŭ lunde matene – la dua pentekosta tago – la kongresanoj laboris, unue en kunveno por regionaj respondeculoj kaj poste en laborgrupoj pri tiuj respondoj, kiujn donis la kluboj pri agadaj demandoj.

Venis la kongresa fermo kun tiu danko al LKK, kiun ni jam menciis. Ingrid Näsholm simbole transdonis la kongresan flagon al Haldo Vedin, reprezentanto de la venontjara kongresurbo Norrköping. Estos aprila kongreso en la tagoj 21-23.

Sed tamen restis unu ero en la kongreso: Ekskurso al la fiŝista vilaĝo Spikarna sur la insulo Alnön.

Tie ni manĝis fiŝkaptistaj specialaĵojn kaj ĝuis belan panoramon el la aŭtobusfenestroj – spite al la pluvo...

Börje Andersson

Nova estrarano, kotizaltiĝo, nova honora membro, loterio

Estis unu ŝanĝo en la SEF-estraro post la jarkunveno. Alia notinda decido estis, ke la jarkotizo altiĝos je 25 kronoj por individuaj kaj ordinaraj klubaj membroj. Sven Sundin, Växjö, estis farita nova honora membro. Lennart Svensson prezentis grandan loterion favore al SEF.

Preskaŭ la tuta 114-kapa kongresanaro jam kolektiĝis en la bela, oportuna kunvensalono de nia kongresejo, kiam Karin Lindquist malfermis la jarkunvenon. Ŝi priskribis la sukceson de la Esperantokursoj ĉe la popolaltlernejo de Karlskoga kaj rakontis, ke la samspeca lernejo de Kungälv havas grandan intereson pri Esperanto. Ŝi substrekkis la ekonomiajn malfacilaĵojn de nia federacio, kun altigita lukosto por la Esperanto-Centro. Sed tamen en tiu ĉi jaro la ekonomio ekhavis ankaŭ luman radion, dank' al la sinofera laboro por *La Espero*, kiun faras en Stokholmo precipe Per Aarne Fritzson kaj Franko Luin. Do ni

ne plu havas kostojn por ekstermovada kompostado.

1293 SEF-membroj
Post la enkonduko Åke Blomberg estis elektita kunvenprezidanto kaj Linnea Edzenius protokolanto.

La nombrado de voĉdonrajtigitoj montris, ke ĉeestis reprezentantoj de 31 kluboj, distriktoj kaj organizo (SEJU). La estrara raporto estis donita al ĉiuj partoprenantoj kaj tute sen diskuto aprobita. Kelkaj eroj el ĝi:

SEF nun havas 1293 membrojn. Kvankam registriĝis 152 novaj membroj dum la jaro, la tuta nombro malkreskis per 77. La mezaĝo de la membraro ja bedaŭrinde estas alta... Tamen 114 membroj nun havas la aĝon de SEJU-membreco.

La jarkongreso en Stokholmo estis rekorda kun 260 partoprenantoj.

Granda stoko de informmaterialo estis fabrikita, daŭre aĉetebla por la kluboj.

Inter 700 kaj 800 homoj atŝkultis tri eksterlandajn prelegantojn, kies turneojn aranĝis Kerstin Rohdin.

Karin Lindquist kaj Ulla Luin faris grandan klopodon por parlamenta apoggrupo.

La klubaj agadraportoj atestis pri pli vigla aktiveco ol kutime.

**Leif Nordenstorm
nova estrarano**

Post la revizora raporto la jarkunveno decidis pri senŝarĝigo de la estraro.


Sekvis la elektoj. Karin Lindquist estis reelektita prezidanto. En la estraro Åke Rohdin rezignis pri reelektito. Bertil Andreasson, kiu antaŭe estis anstataŭanto, nun fariĝis ordinara estrarano. Ulla Luin, Märtha Andréasson kaj Haldo Vedin estis reelektitaj kiel ordinaraj estraranoj. Kerstin Rohdin kaj Börje Andersson restas tiaj dum ankoraŭ unu jaro.

Nova anstataŭanto en la estraro estas Leif Nordenstorm. Ingemar Nordin restas kiel anstataŭanto.

Karin Lindquist kaj Ulla Luin estas reprezentantoj en Sveda Esperanto-Instituto. Aino Åberg, Roland Lindblom kaj Lisbet Andreasson estas elektoprepara komitato.

125 kaj 100 kronoj

La estraro proponis altigon de la kotizo por 1989 per 25 kronoj por individuaj kaj ordinaraj klubaj membroj – do, al 125 respektive 100 kronoj. La ceteraj kotizoj (familiaj kaj junulaj) restos la samaj. Post iom da diskuto la kunveno aprobis la proponon.



La membojn de LKK Sundsvall atendis varmaj aplaŭdoj je la fino de la kongreso, pro la bona aranĝo kiu ebligis agrablan restadon kaj sukcesajn intertraktojn.

Kvar klubaj proponoj
Kuis kvar proponoj de la kluboj sur la tabloj de la jarkunveno. Motala kaj Jönköping proponis matriklojn. La jarkunveno decidis, ke oni faru liston pri la rektaj membroj en lokoj sen kluboj, kune kun iom pli detala listo pri klubaj funkcioj.

Jönköping havis proponon pri la vortaro. Gi estis transdonita al Eldona Societo.

Falköping proponis klopodojn por ke kongresoj ktp ricevu pli da atento de radio, televido kaj gazetaro. La estraro promesis fari kion ajn eblan, sed petas pri helpo de la kluboj por la lokaj gazetoj.

Motala proponis laborgrupon por esplori la eblecojn igi Esperanton rekonita kiel merito por instruistoj kaj uzota en alta edukado. La propono

estis transdonita al la eduka komitato de la estraro.

Buĝeta plano

La ekonomia raporto montris bilancon de 234 439 kronoj kun defcito de 34 005 kronoj. Nun la jarkunveno aprobis buĝetan planon por 1988 kun la bilanco de 210 000 kronoj.

Sven Sundin honora membro

Inĝeniero Sven Sundin, Växjö, dum multaj jaroj ne nur laboris por Esperanto, sed ankaŭ donacis vere grandajn monsumojn al SEF, UEA kaj Eldona Societo en formo de akcioj. La jarkunveno decidis fari lin honora membro.

Olle Olsson, Lund, proponis fondon de sveda sekcio de la veterana klubo. La kongreso kun intereso aprobis lian pro-

ponon kaj atendas sciigojn pri la fondo. Membroj estos personoj kun 40-jara movada fideleco.

Granda loterio

Lennart Svensson, Filipstad, informis pri loterio helpe al SEF. El 5000 planitaj lotoj jam 2500 estas lokigitaj ĉe kluboj kaj membroj. La loterio povas doni al SEF enspezon de 40000 ĝis 50000 kronoj.

Åke Blomberg substrekiis la sentojn de aprezo, kiujn la jarkunveno havas pro la energio kaj kuraĝo de la iniciatinto de la loterio.

Fermante la jarkunvenon, la prezidanto Karin Lindquist dankis Åke Rohdin pro lia laboro kaj transdonis donacon al li. Si ankaŭ bonvensalutis la novan estraranon Leif Nordenstorm.

Börje Andersson

Jadwiga Gibczynska ludis por emociita publiko

Multaj svedaj esperantistoj memoras la turneon de la pola aktorino Jadwiga Gibczynska tra nia lando aŭtune 1981. Kun granda ĝojo la kongresanoj en Sundsvall nun povis noti ŝian kunagon tie.

Antaŭ emociita publiko ŝi ludis dramigitajn fragmentojn el la libro "La lastaj infanoj de Oldrovalo". Joachim Giessner el Herzberg, FRG, kiu tradukis la libron en Esperanton, ĉeestis ankaŭ, kaj enkonduke prezentis la teatraĵon.

Ni, kiuj jam legis la libron, iom miris pri la informo, ke eĉ fragmentoj el ĝi povus esti prezentitaj en formo de monologo. Temas ja pri kortuŝa priskribo de la lastaj tagoj de la mondo post nuklea milito. Sed Jadwiga Gibczynska estas maj-

strino de tiaj "spektakloj ĉe tablo". Eluzante ĉiom el sia rutino kaj lerto post longa sukcesa kariero en kaj ekster Eŭropo, ŝi donis tiel skuan bildon pri la okazaĵoj en Oldrovalo, proksime de Fulda en FRG, ke ŝia publiko sidis preskaŭ terure kaptita.

Komenciĝis per rido kaj gaja, feliĉa vizaĝo, ĉar ŝi volis priskribi belan junian tagon, "pli belan ol oni povas imagi", kiun juna germanino travivas en sia aŭto survoje al ekskurso. La tuta mondo aspektas belega. Feliĉe kantante ŝi sidas malantaŭ la stirilo... kiam subite ŝin ŝoke blindigas terura lumo. Ie en la mondo homo premis ruĝan butonon, kaj nia planedo fariĝis cindre bruna.

Jadwiga tiel realisme pri-



Inter kantema gajeco kaj plej profunda maltrankvilo kaj terurigo ŝanceliĝis la sentoj de la virino en la unupersona dramo, rolo, kiun Jadwiga Gibczynska majstre prezentis.

skribis la sekvajn okazaĵojn, ke la tuta publiko sentis, kvazaŭ premiĝus iliaj koroj. Admona estis la fina alvoko: Ni devas klopodi, ke io tia ne okazos. Eĉ se ni povas fari tre malmulte, ni tamen ĉiuj faros tion!

Börje Andersson

Karl-Erik Svartberg:

"Via movado estas vera pacmovado"

"La homaj rajtoj" estis la temo de la prelego de parlamentano Karl-Erik Svartberg, prezidanto de la sveda UN-asocio, dum la kongreso en Sundsvall.

– Libereco estas libereco nur por tiu, kiu havas rajton pensi alie, li citis Rosan Luxemburg. Li salutis la esperantistojn nome de la UN-asocio kaj aldonis:

– Eĉ se ni ne estos tiel favoraj al Esperanto dum nia venonta kongreso en Umeå, kiel vi povus deziri, mi tamen scias, ke estas granda ĝojo por ni havi Svedan Esperanto-Federacion kiel membron. Persone mi ĉiam rigardis la Esperantomovadon kiel pacmovadon, ĉar vi havas tiom da bonaj kontaktoj en la tuta mondo.


Karl-Erik Svartberg ankaŭ citis Olof Palme:

– Kial eĉ unu sola infano devas morti pro tio, ke ni ne scias dividi la rimedojn? Infanoj, kiuj mortas, antaŭ ol ili scias, kion signifas homaj rajtoj.

– Sed la situacio ne estas senespera. Same kiel la nuklea situacio subite pliboniĝis, ankaŭ povos la situacio pri homaj rajtoj. Vi en la Esperantomovado scias, kion signifas havi celon en fora estonteco!


Ne ĉiuj ŝatas Esperanton... Post la prelego de Karl-Erik Svartberg venis la vico por la finna lingvisto Kaarlo Voionmaa. Li faris sian unuan prelegon en Esperanto – sukcese...

– Ni devas realisme konstati, ke ĉiuj ne ŝatas Esperanton, li diris. La angla lingvo konkeris la komunikadon, la komputilojn kaj la muzikan mondon. Sed Esperanto montris, ke ĝi estas tre bona pont-



Ne eblis dubi pri la simpatio al Esperanto, kiun Karl-Erik Svartberg esprimis, kaj ĝi certe kreskis dum lia restado inter la esperantistoj

lingvo el multaj vidpunktoj. Oni kritikis ĝin, ke ĝi estas hindo-eŭropa lingvo, sed ĝi fakte laŭ sia strukturo similas la finn-ugrajn lingvojn. Hodiaŭ ĉiu oka svedo estas enmigrinto de unua aŭ dua generacio. Tiun



Pri Esperanto kiel pontolingvo temis la prelego de Kaarlo Voionmaa, doktorando ĉe la universitato de Gotenburgo

fakton la Esperantomovado devas atenti kaj eluzi.

"Mi multon lernis pri via movado"

El la posta diskuto ni povas citi:

Bertil Andreasson: Esperanto ĉiam gardis la rajtojn de gepatraj lingvoj.

Ingrid Näsholm: La multa uzo de la angla lingvo en Svedio kaŭzas supertakson de anglaj esprimoj kaj subtakson de same bonaj svedaj esprimoj.

Wim Posthuma: Esperanto havas aziajn trajtojn, do ne estas nur hindo-eŭropa lingvo. Al tiuj, kiuj diras, ke Esperanto ne taŭgas, mi volas diri: Lernu la lingvon kaj vi vidos!

Karl-Erik Svartberg: En Sundsvall mi jam lernis multon pri via movado. La parlamenta prezidanto ja estas lerta esperantisto kaj estas ankaŭ aliaj parlamentanoj, kiujn oni preskaŭ povas nomi esperantistoj. Mia antaŭulo kiel parlamentano por Bohuslän, Einar Dahl, opiniis, ke Esperanto estas same grava, kiel la socialdemokratio...

Mats Landfors: Kio okazus en UN se oni komencus uzi Esperanton kiel pontolingvo tie?

Svartberg: Estus ne pli strange, ol tiu fakto, ke oni jam enmetis sesan laborlingvon, la araban.

Ingemar Nordin: Piron ja montris, ke Esperanto kaj la ĉina lingvo estas konstruitaj sammaniere.

Franko Luin: La plej grava afero estas, ke la uzo de Esperanto povas liberigi rimedojn, kiujn oni povas utiligi alimaniere.

Börje Andersson

Junularo

SEJU-jarkunveno en Sundsvall

La kongreson en Sundsvall partoprenis ĉirkaŭ dudek el la membroj de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo. LKK bone aranĝis por ili, ekzemple per amasloĝejoj, kiu situis proksime al la kongresejo.

SEJU-anoj kontribuis al la kongresa programo per prezento de sveda Esperanto-teatraĵo "De fem världsdelarna", verkita en 1931 de Elma kaj Einar Adamson.

La jarkunveno de SEJU okazis dimanĉe la 22-an de majo. Post la jarkunveno kaj la konsistiga estrarkunveno, oni povis konstati, ke la estraro por la venonta jaro aspektos jene:

Prezidanto: Lena Månsson, Stokholmo, sekretario: Mikael Hultgren, Norrköping, kasisto: Elisabeth Ahlgren, Stokholmo, estraranoj: Berit Posthuma,

Stokholmo, Helene Brännmo, Sundsvall, Katarina Larsson, Stokholmo, kaj Camilla Persson, Hallsberg. Kiel anstataŭantoj oni elektis Per Aarne Fritzson, Per Ola Axelsson, ambato el Stokholmo, kaj Lorena Diaz Gallardo, Västerås.

Post la raportoj kaj elektoj, la jarkunveno ĉefe diskutis la proponon, kiun SEJU jam faris al TEJO, aranĝi la Internacian Junularan Kongreson (IJK) en Svedio en aŭ 1991 aŭ 1992, depende de kiam okazos la Universala Kongreso en Bergen, Norvegio.

Lena Månsson

ILEI- jarkun- veno

La sveda sekcio de ILEI jarkunvidis la 22-an de majo en Sundsvall. Oni pritraktis kaj aprobis la jarraporton, kiu i.a. priskribis la agadon en la lernejoj. Kelkloke troviĝas aprobataj lernoplanoj por Esperanto kiel aldona fako en la 7-a ĝis la 9-a klasoj, sed bedaŭrinde ne sufiĉe da gelernantoj elektis tiun temon por starigi kursojn. Tamen, en kelkaj lernejoj oni studis Esperanton dum t.n. libervolaj aktivecoj.

Informado en la lernejoj okazis speciale kiam eksterlandaj esperantistoj turneis en la lando.

La jarkunveno ankaŭ aprobis la kasan raporton kaj donis malsarĝon al la estraro.

Kiel prezidanto por la venonta jaro oni reelektis Bertil Andreasson, kaj kiel estraranoj oni elektis Inga Johansson, Lars Forsman, Bertil Nilsson kaj Lisbet Andreasson.

Karlskoga Folkhögskola
anordnar för tredje sommaren i rad en veckokurs i

ESPERANTO

Undervisning på olika nivåer:

Nybörjar-, fortsättnings- och konversationskurs

Zofia Banet-Fornalowa och Lars Forsman är två av språklärarna

Kurstid

Måndag 27/6 kl. 10.00 - lördag 2/7 kl. 15.00

Kostnad

Internatelever: Helinakordering med logi i dubbelrum (exkl. sänglinne) 1050:--
Tillägg för enkelrum 225:--
Externatelever: lunch och kvällsarrangemang 385:--
Litteraturkostnad: ca 50:--

Anmälan/avgift

Anmälningsavgift (ingår i kursavgiften) 100:--

nbetalas snarast möjligt till Karlskrona Folkhögskola, Box 192, 691 24 Karlskoga, Postgiro 13 03 56-9.

Ange på talongen "ESPERANTO", eventuella förkunskaper, önskemål om enkelrum, vegetarisk eller annan kost. Glöm ej namn, adress och telefonnr.

Dagsstudiestöd kan sökas. Vänd dig till Arbetsförmedlingen.
Upplysningar: tel. 0586 - 50360. Kursledare Lars Forsman

OBS! Långkurserna fortsätter till hösten!
Nybörjarkurs 22 augusti
Fortsättningskurs 24 oktober

Lund 18-21 de aŭgusto 1988

Aliĝu al Kultura Esperanto-Festivalo

Denove okazos la Kultura Esperanto-Festivalo. Se vi ĉeestis la unuan en Uppsala en 1986, vi scias pri kio temas: Vera festo por la viva, originala kulturo de nia internacia lingvokomunumo. Pli ol tri tagoj dediĉitaj al teatro, muziko, poezio kaj ĉiuj ceteraj kampoj de nia "indigena" kreivo.

Ci-foje ni antaŭvidas i.a. novpreparitajn prezentojn de la teatraj grupoj La Krizalido kaj TESPA, recitalojn muzikan de Nikolin Pairoux kaj poezian de Jarlo Martelmonto, rokkoncerton de Persone, prelegojn de Perla Martinelli, kaj multon pli.

La situo de Lund certe helpos al vere internacia aranĝo.



Kondiĉoj de aliĝo

La aliĝo validos post nia ricevo de via antaŭpago de 50 kronoj.

Kotizoj:

Kultura programo	150 kr
Manĝoj	150 kr
Amasloĝejo	50 kr

Je aliĝo post 1988-07-15 aldoniĝos kroma kotizo de 50 kronoj. Pagu al poŝtgira konto 488 88 54-9, Kultura Esperanto-Festivalo. Zorge indiku sur la pagilo/aliĝilo precize kion vi mendas, kaj ĉu vi estas vegetarano aŭ ne.

"Amasloĝejo" signifas, ke vi dormos surplanke en propra dormsako. Kunportu matracon.

"Manĝoj" inkluzivas po tri maten-, tag- kaj vespermanĝojn.

Se vi preferas mem zorgi pri loĝado, ni pretas helpi vin rezervi lokojn en junulargastejo aŭ hotelo. Indiku tion sur la aliĝilo.

Adreso:

Kultura Esperanto-Festivalo, Esperanto-Centro, Brunnsгатan 21, 111 38 STOCKHOLM

Sveda Esperanto-Instituto

Jarraporto

La direkcio dum la jaro konsistis el: Ebbe Vilborg, Göteborg (prez.), Lennart Åberg, Göteborg (sekr.), Märtha Andréasson, Hisings Kärra (kas.), Bertil Andréasson, Hörby, Inga Johansson, Göteborg.

La direkcio havis dum la jaro kvar protokolitajn kunvenojn.

Tago por la skriba ekzameno estis la 26-a de aprilo. Por la elementa ekzameno partoprenis 23 personoj, por la supera unu. La plejmulto el la skribintoj trapasis ankaŭ la parolan ekzamenon antaŭ la fino de la jaro.

La informfolio "Faktoj pri Svedio" aperis kunlabore kun Sveda Instituto.

La instituto reprezentigis per siaj prezidanto kaj aliaj direkciaj okazoj de la librofoiro en Göteborg en aŭgusto (prelego, stando, informado).

La direkcio krome laboris super jenaj aferoj: Rekomendita literaturo por la supera ekzameno, ĝisdatigo de la listo pri lerniloj kaj instruiloj, starigo de listo pri ekzamenaj reprezentantoj diverslokaj.

La arkivo de la instituto translokiĝis de Johannesbergsgatan 18 al Magasinsgatan 23 (ambaŭ en Göteborg) pro ĉeso de la lukontrakto ĉe la unua adreso.

La instituto asignis 500 kronojn al la librofoiro en Göteborg kaj 1000 kronojn al L. Forsman, Karlskoga, kiel subtenon al la nove aranĝitaj Esperantokursoj ĉe la tiea popolaltlernejo.

El tri anoncigitaj junulaj stipendioj po 300 kronoj, unu estis asignita al partoprenanto en la internacia kurso en Kungälv en junio.

Por la Direkcio:
Ebbe Vilborg, prezidanto

Falköping på Esperanto

Från Engelska Esperanto-förbundet BEA kom en önskan att få 150 broschyrer om Falköping på Esperanto, som de läst om i UEAs (Universella Esperantoförbundets) delegatårsbok. BEA skulle dela ut dem till alla sina anslutna distrikt och klubbar i landet samt till Esperantohotellet i Morecambe, som ligger på Englands västkust.


Tack vare denna förfrågan fick turistansvariga upp ögonen för att också Esperanto är ett användbart språk i turistreklamens tjänst. Och Esperantoklubben fick i uppdrag att översätta den nya "Falköping – en resa i tiden". Det hela har nu blivit klart och tryckt i form av ett inläggshäfte, som översänts till BEA i England.

45 lernantoj en dutaga Skövde-kurso

La Esperanto-klubo en Skövde invitis al dutaga semjnfina Esperanto-kurso fine de marto. Venis 45 partoprenantoj, inter kiuj multaj estis junuloj.

En kvin grupoj sur niveloj komencanta, daŭriga kaj konversacia, ĉiuj diligente kaj gaje studis, gvidataj de Anne-Marie Wängdahl, Gunnar Olsson, Sten Broman, Gustav Stenholm, Kurt Frisk kaj Hilgon Frisk. La kurso okazis en Västerhöjds skolan en Skövde, dank'al du esperantistoj inter la instruistoj tie, Solveig Bertilsson kaj Karl-Erik Olsson.

Tia tipo de kursoj estas vera



La sekretario de la Skövde-klubo, Sten Broman, instruas unu el la grupoj dum la semajnfina kurso en Skövde. /Foto: Skövde Nyheter/

bezono, opiniis multaj kontentaj partoprenantoj. Vespere oni generale ne havas tempon. Grave estas ankaŭ, ke la tuta kurso kun manĝa regalo estis tute senkosta. Tro multe da Esperanto-aranĝoj hodiaŭ estas tro kostaj por precipe junuloj.

La pola aktoro Jerzy Fornal, kiu pasis tra Skövde dum sia sveda turneo, ankaŭ partoprenis kaj dum amuza vespero prezentis brilan pantomiman teatraĵon.

Fine de la kurso, multaj voĉoj aŭdiĝis por pliaj tiaspecaj kursoj.

B.A.

Raporto el la Sudorienta Regiono

Sabate la 26-an de marto la esperantistoj el la regiono Småland-Blekinge kunvenis en Växjö. La bone visitata kun-

veno okazis en la altlernejo de Kronoberg, kie Sven Österberg bonvensalutis al agrabla kunestado.

La ĉefa programo de la kunveno enhavis du erojn, prezentitajn de la pola aktoro Jerzy Fornal el la Nacia Teatro en Varsovio. Unue li lerte prezentis mimteatraĵon "La granda koncerto", akompanata de muziko. Post paŭzo li brile prezentis monodramon titolitan "Sopiro, laboro, espero". En la dramo li rakontis pri la vivo de Zamenhof kaj deklamis poemojn kaj interesajn eldirojn de la kreinto de Esperanto. Ankaŭ tiu prezentado estis akompanata de bela muziko. La programo de Jerzy Fornal estis la sama, kiun li unue prezentis dum la jubilea kongreso en Varsovio, kaj ĝi vere estis alte taksita kaj ŝatata ankaŭ en Växjö.

Dum la printempo la juna japanino Kimie Markarian vizitis Oskarshamn, Kalmar kaj Högsby kaj vekis grandan inte-

reson en la lernejoj, kie ŝi interalie instruis pri la japana abako "soroban"

En Växjö funkciis dum la vintra sezono vigla studrondo, gvidata de lektoro Sam Fritz el Karlskrona kaj inĝeniero Sven Sundin el Växjö. Espereble la rezulto de la fervora studado estos nova Esperantoklubo en la centro de Småland.

Esperanto en la proksimradio de Uppsala

Ek de la 13-a de marto, la Esperanto-Societo de Uppsala ĉiudimanĉe je la 12-a horo sendas duonhoran programon en la proksimradio de Uppsala. La frekvenco estas 99 mHz.

TEDU-träff vid Åsa Folkhögskola

TEDU-regionens Esperantoklubbar m fl hade sânt 25 deltagare till en regionsträff vid Åsa Folkhögskola i närheten av Katrineholm den 5-6 mars. Även ett par personer från Stockholm deltog.

En nybörjarkurs förekom under ledning av Inga Johansson, Göteborg, och en konversationskurs med Haldo Vedin och Kerstin Rohdin som ledare. En nyhet för året var en halvdagskurs för funktionärer. Denna kurs var anordnad främst därför att det ibland är svårt att få medlemmar att åtaga sig styrelseuppdrag för att de inte anser sig insatta i sådana göromål. Skolans lärare Ingemar Svensson informerade om allmän föreningkunskap och Ulf Ribers om frågor inom Esperantorörelsen.

Under lördagskvällens sammankomst ägnade man sig åt verksamheten på regionsplanet och inom klubbarna. Som ett speciellt inslag hade japanskan Kimie Makarian engagerats och lämnade först en kort information om Japan och sedan redogjorde hon för användningen av kulramen SOROBAN - en enkel och billig "räknemaskin", som i snabbhet tävlar med miniräknarna.

Åsa folkhögskola var en mycket uppskattad samlingsplats och samarbetet med Ingvar Svensson, som representerat skolan, var mycket uppskattat. Ryktet om att skolans elever vid de långa kurserna brukar öka 8 kg i vikt, var ingen överraskning för esperantisterna efter att ha avnjutit måltiderna! Lupo

Polsk skådespelare från Warszawa på turné i Sverige

Jerzy Fornal, som spelar bl a på teatrarna i Kulturhuset i Warszawa och i polsk TV, besökte flera orter och klubbar i Sverige under mars. i Norrköping spelade han "Aniara". Tidningarna där skrev flera artiklar om att Bertil Nilsson i Nyköping medverkat i översättningen av Harry Martinssons mästerverk till Esperanto, som sedan dramatiserats av Jerzy Fornal.

På en del ställen framförde han en monolog om Zamenhofs liv, som bygger på Zamenhofs dikter och tal. Den skrev han till UK i Warszawa 1987. Han medverkade bl a på en regionskurshelg i Skövde och på en regionträff i Växjö. I Falköping framförde han en mimföreställning i skolor och på biblioteket.

Jerzy Fornal är en framstående mimare och på flera ställen fick man njuta av hans föreställning "Den stora konserten". I Stockholm framförde han "Aniara" på ett polskt kulturkafé.

Till hösten kommer Stanislaw Burba att turnera genom Sverige. Intresserade klubbar kan höra av sig genast till Kersti Rohdin, tel. 0491/204 61.

Kerstin Rohdin

Gramatika meditado

Komencantoj malbone komprenas la esprimon "Kiel eble plej...". Ankaŭ mi mem preferas "Plejeble...!! Kial oni uzu la unuan esprimon? Kiu volas diskuti tiun aferon?"

Sören Sandqvist

Donacoj: Klubo EC

La estrara alvoko al helpo pri la altigitaj lukosto de Esperanto-Centro en Stokholmo (nun 57 900 kronojn jare) jam donis multajn belajn respondojn. Ok membroj kaj kluboj donacis po 1000 kronojn al "Klubo EC", kaj pliaj certe venos:

Albin Skånander, Stockholm
Nynäshamns Esperantoklubb
Ragnar Hjorth, Stockholm
Ulla Luin, Tyresö

William Malmsten, Göteborg
Alf Sundberg, Linköping
"PLUPO", Motala
Västerås Esperantoklubb

Tra la mondo

Vintraj tagoj de EAF Urbestro parolis Esperanton!

"Mi parolas Esperanton publike unuan fojon, kvankam mi lernas ĝin jam de 20 jaroj", diris urbestro Aaro Heikkilä en sia parolado kaj surprizis la publikon dum la Vintraj Tagoj de EAF (Esperanto-Asocio de Finnlando), kiuj okazis en la urbo Joensuu en orienta Finnlando la 27-an kaj 28-an de februaro.

Urbestro Heikkilä estas konata pro sia neformaleca agado en evoluigado de Joensuu. Tutlandan konatecon li ekhavis pasintjare, kiam li uzis urban monon por aĉeti kaj vendi akciojn.

Ankaŭ esperantistoj povis profiti de la malkaŝigo de la urbestro-kaŝesperantisto, ĉar la urbo elspezis 3000 markojn por regali partoprenantojn per manĝaĵoj kaj drinkaĵoj ĉe urba akcepto.

La jarkunveno mem estis sensurpriza. En la nova 10-membra estraro de EAF nun estas tri FEJO-anoj, ĉar Jukka Pietiläinen estis elektita kiel anstataŭanto. Antaŭe en la estraro estis jam Jens-Petter Hansen kiel ordinara membro kaj Tiina Kilpinen kiel anstataŭanto. Ankaŭ la prezidanto de EAF, Jukka Laaksonen, estis reelektita.

La jarkunveno de FEJO (Finnlanda Esperantista Junulara Organizo) elektis novan estraron kun unu ŝanĝo. Anstataŭ Sigrid Kivistö estas nun Rami Saari. Post tiu ĉi ŝanĝo la tuta estraro estas nun malpli ol 26-jara: Prezidanto Sasa Ståhlberg, vicprez. Jukka Pietiläinen, sekretario Jens-Petter Hansen, estraranoj Tiina Kilpinen,

Riitta Pulli, Anna Riitamäki kaj Rami Saari.

Jukka Pietiläinen

Esperanto- elsendoj de la Itala Radio

Radio Roma (RAI) elsendas en Esperanto ĉiun sabaton je la horo 20.00 laŭ grenviĉa tempo (GMT), kiu egalas al horo 21.00 laŭ mez-eŭropa tempo (kaj al 22.00 en Italio kaj en multaj eŭropaj landoj dum la periodo de somera horo). La elsendoj okazas laŭ jenaj frekvencoj/ondolongoj:

kHz	11800	9710	7275
metroj	25,42	30,90	41,24

Adreso: Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, Centro Corr., I-00100 Roma RM, Italio.

Al raportoj pri aŭskulto oni respondos per konfirmo-kartoj (QSL) en Esperanto.

Dankvortoj de Roman Malinowski

Finigas la solenado de la Jarcento de la Internacia Lingvo Esperanto en Pollando kaj en la mondo. La apogeo de la celebrado de tiu ĉi datreveno estis la 72-a Universala kongreso de Esperanto en Varsovio, kiun akompanis aliaj kongresoj, konferencoj kaj fakaj renkontigoj en diversaj urboj de Pollando, i.a. en Bjalistoko, la naskiĝurbo de la kreinto de Esperanto, d-ro L.L. Zamenhof.

Multaj miloj da partoprenintoj omagis nian grandan sam-

landanon, kies verko praktike servas al la realigo de la interkomprenigo inter la multnombraj amikoj de nia patrujo kaj kontribuis al la profundigo de la sentoj de simpatio kaj amikeco al nia popolo.

Mi esprimas al vi mian tutkoran dankon kaj mian altan rekonon pro la eminenta kontribuo al la realigo de la jubilea programo.

Roman Malinowski
La Alta Protektanto de la
72-a Universala Kongreso

Junulara laborbrigado

Inter la 10-a de julio kaj 6-a de aŭgusto la Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio organizos laboraranĝon "Sarajevo 88" en la urbo Sarajevo. Antaŭtagmeze oni laboros, posttagmeze okazos kulturaj kaj distraj aktivecoj. Post la aranĝo estos ekskursoj en la regiono. La organizanto transprenos ĉiujn restad- kaj vojaĝkostojn en Jugoslavio.

Bv. turni vin al JEJA, Danijels Ozme 7/TV, 71000 Sarajevo, Jugoslavio.

Docentiĝo de d-ro Detlev Blanke

La ministro pri altlernejaj kaj faklernejaj aferoj de GDR la 1-an de februaro nomumis d-ro Detlev Blanke "honora docento" pri interlingvistiko ĉe la Humboldt-universitato en Berlino. La fako interlingvistiko estas oficiale ligita al la soci-sciencia fakultato de la universitato. La docenteco ebligas certigi sisteman prelegadon kaj instruadon, stimuladon de diplomlaboraĵoj, doktoriĝaj disertaĵoj kaj de aliaj universitatnivelaĵaj aktivecoj.

Post la Eötvös Lorand-universitato en Budapest, la Humboldt-universitato en Berlin estas la dua en la mondo, kiu enkondukis interlingvistikon je docenta nivelo.

D-ro Blanke, kiu ek de la nomumigo ankaŭ apartenas al la universitata instruistaro, tamen restos sekciestro en la Kulturligo, kiu plene subtenas lian novan scienca agadsferon.

Ankaŭ jubileo

Antaŭ cent jaroj fondiĝis la unua Esperanto klubo en Nürnberg. Tion oni volas festi la 21-23 de oktobro 1988.

Al tiu jubilea festo invitas la Bavara Esperanto-Ligo kaj ili informas, ke ili rezervis bonajn hotelĉambrojn, kiuj kostas nur 115 DEM por du tranoktoj.

Aligiloj estas haveblaj de:
Esperanto-Grupo Nürnberg,
Pirkheimerstr. 11/I,
D-8500 Nürnberg.

Dua Somera Lernejo pri Komputiko

"Enkonduko al dizajno kaj enplantado de programaroj". Jen la titolo de unusemajna komputika kurso en Esperanto, kiu okazos de la 3-a ĝis la 10-a de julio 1988 en Bieuzy-Les-Eaux (Bretonio, Francio).

Kotizo je aliĝo antaŭ fino de majo: 1.100 FRF por kurso kaj gastigado en kolektivaj dormejoj. Eblas tendumi kaj hoteli. Familianoj estas akceptataj.

La kurso, por komencantoj pri komputiko kaj por personoj kun kelkaj scioj pri programado, celas prezenti bazajn programad-elementojn kaj ilojn por metode konstrui programarojn.

Informoj pri la kursenhavo kaj aliĝilo estas haveblaj de:
Esperanto,
60 allée de la Renaudière,
F-35510 Cesson-Sevigne.

La medikoboldo Plupo havas propran arbaron

"Kial Plupo ne loĝas en Gällivare?" (jelivare), la 6-jara Björne demandis sian patron Lars Israelsson antaŭ unu jaro. Plupo estas la malgranda nevidebla medikoboldo, pri kiu Inga Borg verkis multajn librojn. Unu el ili temas pri Plupo en la lando de la noktomeza suno, kaj kie ĝi situas, se ne en Gällivare?

Patro Lars, kiu estas prezidanto de la hejmrregiona societo en Gällivare, ekhavis ideon. Longe mankis agadeblecoj por infanoj en la hejmrregiona

parko. Eble Plupo povus transloĝiĝi tien kun sia kabano kaj siaj amikoj Ermeno kaj Lemingo.

Hodiaŭ la Plupo-arbaro estas realaĵo, je raviĝo de ĉiuj infanoj. Ĝi situas en la hejmrregiona teritorio kaj estis inatigurita la 15-an de junio 1987. Bone planita merkatiĝo faris, ke infanoj el la tuta lando dum la pasinta somero kunlogis siajn gepatrojn al Gällivare. Ili venas per trajno aŭ la familia ruldromo, kaj ili jam longe antaŭe mendis

lokon. Kaj kvankam Plupo vere estas nevidebla, li/ŝi nun sidas en sia kabano kaj trikas ŝtrumpetojn el kaproharo por la vintra bezono.

Ni volas doni al la infanoj datiran natur-travivaĵon, diras Per Sönnermo, kiu estis projektgvidanto dum aranĝo de la Plupo-arbaro.

Kion do la infanoj povas sperti? Nu, ne estas facile scii, ĉar la tuta aranĝo estas sengepatra. Sed iom mi tamen povas malkaŝi. Unue oni kolektiĝas por spekti fingromarionetan ludon kaj konatiĝas kun Plupo kaj liaj amikoj. La vojo al Plupo-arbaro komenciĝas per flosveturo, kaj post tio atendas Plupo en la kabano kun vakcina suko kaj mirtela kuko. Tie la infanoj ricevas mallongan lecionon pri naturscio, kaj Plupo kutimas kuiri supon el naturaj herboj. En la arbaro la infanoj ŝteliras por ekvidi la sorĉbestojn ermeno kaj lemingo. Post la vizito en la arbaro, oni rajtas labori per naturaj materialoj en malgranda laborejo.

Estas certe centmiloj da infanoj, kiuj elkreskis kun la libroj pri Plupo. Ĉirkaŭ tridek tiaj estiĝis, kaj la unuajn Inga Borg verkis jam en la 50-aj jaroj. La rakontoj temas pri la sovaĝaj bestoj en la naturo, kaj estas pleje legataj de infanoj 6 ĝis 12-jaraj. Ĉiu libro estas ordinare presita en 10 000 ekzempleroj, kaj multaj estas tradukitaj al fremdaj lingvoj. Jus aperis Plupo en la lapona kaj en Esperanto.

Plupo en Esperanto

Ĝis nun aperis kvin Plupo-libroj en Esperanto, eldonitaj de Progreso Eldonejo en Motala: Plupo kaj la grupoj, Plupo kaj la lupoj, Plupo kaj la maro, Plupo en la grandarbaro, Plupo kaj la ursidoj.

Malte Markheden
(laŭ artikolo en
Bygd och natur)

Kiel skribi artikolon pri esperanto?

Ciam estas grave fari propagandon, favore al Esperanto. La svedoj sciis, kio estas Esperanto kaj kiun celon havas la esperantistoj!

Oni tiucele rekomendas al ĉiu kompetentulo kunlabore skribi gazetartikolojn. Jes, tio estas gravega afero. Ĉu multaj svedaj esperantistoj estas pretaj kunhelpi?

Unu afero estas skribi taŭgan lingvaĵon. Alia afero estas konvinki la redaktorojn, ke viaj skribajoj estas legindaj, kaj ke oni donu al via verko spacon en la koncerna gazeto.

Dum almenaŭ 25-jara skribado en gazetoj mi spertis, ke gravega afero estas persona konateco, ĝuste kun tiuj redaktoroj. Vi vizitu la lokan redakcion, kaj se oni ne tie decidas pri la enhavo de la gazeto, vi ankaŭ vizitu tiun personon, kiu do rajtas decidi. Kaj tie vi prezentu vin mem. Dum tia vizito vi ankaŭ iom lernas, kia estas tiu persono, kun kiu vi estonte matĉos kaj kies bonvolon vi poste bezonos.

Ni esperantistoj do helpu unu la alian gazete diskonigi Esperanton.

Sören Sandqvist

tiĝo por Småland-Blekinge, kiu okazis en Värnamo.

Anna, vi restas en tre hela memoro.

Kerstin Rohdin

Ragnar Hjorth,
Stockholm

Ragnar Hjorth, iama vicprezidanto de Sveda Esperanto-Federacio, mortis en Stockholm en majo 1988 je la aĝo de 78 jaroj.

Li laboris profesie en la sveda aŭtoritato pri arbarprikzorgo. Li estis ĉefo de ĝia sekcio pri arbarpolitiko kaj funkciis, ankaŭ post sia pensiigo, kiel spertulo pri arbarpolitikaj demandoj en ŝtataj esplorgupoj.

Jam en la junaĝo li interesiĝis pri esperanto kaj pri ĝia literaturo. En la 70-aj jaroj li estis vicprezidanto de SEF, kie li kontribuis per sia kono de oficialaj instancoj kaj altranguloj. Post la pensiigo li laboris per libroservo de esperantaj libroj kaj pri la federacia biblioteko.

ulu

Nekrologoj

Gunnar Mattsson,
Skövde

Klubo Esperantista en Skövde funebras post la morto de unu el siaj plej aktivaj kaj laboremaj membroj, Gunnar Mattsson.

Li estis 78-jara, sed lia esperantista vivo ampleksis nur la lastajn jardekojn de lia vivo. Des pli ardaj por nia lingvo estis tiuj jaroj. Interalie li estis diligenta organizanto de la SEF-kongreso en Skövde en 1984. Okaze de tiu kongreso li ankaŭ iniciatis kaj eldonis esperantistan kantlibron, kiu fariĝis konata eĉ eksterlande. Muziko kaj kanto estis nome ankaŭ unu el liaj grandaj intereso. Ofte kun sia violono li briligis klubajn kunvenojn. En la pola Miedzy Gorze oni ancorati parolas pri la sveda muzikanto, kiu pintis gajan geedziĝo-feston procesion tie.

Dum multaj jaroj Gunnar Mattsson senlace organizis grandajn loteriojn, kiuj fortigis la ekonomion de la Esperantoklubo en Skövde kaj ebligis ĝian laboron. En La Espero li donis proponojn al aliaj kluboj sammaniere agi.

Börje Andersson

Anna Lorentz,
Värnamo

La nova membro de SEF, kiu membriĝis dank'al la korespondanta kurso, laboris energie kaj vige por Esperanto en Värnamo. Kun granda dankemo kaj ĝojo mi memoras pri multaj interparoloj kun la nova kaj "juna" esperantisto, la 82-jara verkistino, kiu inter alie verkis la librojn pri Lina Läsepiga.

Anna Lorentz estis kunaranĝanto de la regiona renkon-

Sonbenda kurso

Nun ekzistas sonbende malgranda kurso de Esperanto en 6 lecionoj po 15 minutoj, bazita sur studmaterialo verkita de Ingemar Nordin. La kurso estas mendebla de: Östergötlands läns AV-central, L25730, Box 325, 581 03 LINKÖPING.

La tekstkajeroj estas mendeblaj de Esperanto-Centro.

STEN SVENONIUS
ERIKSTORPSGATAN 26 A

- 2

217 54 MALMÖ

Donacoj al SEF

Bengt kaj Ruth Alsén, Vingåker (el kio 200:- al vortaro)	345:-
Claes-Göran Ingerstedt, Vällingby	100:-
Arne Andersson, Falun	100:-
Inger Lannergård, Karlskoga	100:-
Thordis Samuelsson, Jönköping	100:-
Eugen Rytenberg, Uppsala	100:-
David Sandström, Malmö	200:-
Helsingborgs Esperantoförening	300:-
Tore Gustafsson, Skövde memore al Gunnar Mattsson	200:-
Torgny Sjödin, Örebro (anstataŭ naskiĝtaga donaco al frato, kiu preferas donacon al SEF)	200:-
Olof Sjödin, Tranås (okaze de naskiĝtago de lia patro)	600:-
Claes-Göran Ingerstedt, Vällingby	200:-
Harry Nordlöf, Johanneshov (*Volas iomete subteni vian grandva- oran laboron. Amike - pli ol 50 jaroj kiel esperantisto*)	500:-
Hildur Södergren, Borlänge	220:-
Ruth kaj Bengt Alsén, Vingåker memore al Gunnar Mattsson	100:-
Gulli Svensson, Malmö honore al 100-jara Martha Colliander	100:-
Åke Florbäck, Bromma (*Mi gratulas 75-jaran La Esperon*)	75:-
Simpla donaco	50:-
Yngve Sörman, Johanneshov	100:-
Lia Eriksson, Stockholm	100:-
Torsten och Gertrud Lund, Malmö	500:-

Pliaj donacoj - al Klubo EC, Klubo Cent
aŭ kiel ĝeneralaj donacoj - estas bonvenaj
al Svenska Esperantoförbundet,
poŝtgiro 20 12 - 3.

Donacoj: Klubo Cent

Tore och Signild Johansson, Kalmar	200:-
Alingsås Esperantoklubb	100:-
Harry Olsson, Vällingby	100:-
Maj-Britt Clausson, Arlöw	200:-
Estrid Lind, Krylbo	100:-
Bertil Bengtsson, Hallsberg	100:-
Åke Florbäck, Bromma	100:-
Karl Buremo, Jönköping	100:-
Harry Persson, Motala	100:-
Fritz Ström, Kumla	100:-
Gävle Esperantoförening	100:-
Gun Gerdman, Stockholm	100:-
Hildur Södergren, Borlänge	100:-
Arvid Johansson, Huskvarna	100:-
Valfrid Sandén, Bromma	100:-
William Malmsten, Göteborg	100:-
Erik Brenander, Fyrunga	100:-
Ivar Paulsson, Solna	100:-
Edith Köhler, Gislaved	100:-
Ruben Enocson, Solna	200:-
Karl Söderberg, Uppsala	100:-
I. Ideland, Staffanstorps	100:-
Inger kaj Kjell Sjöberg, Götene (festas 100 jarojn de suma aĝo)	100:-
Hässleholms Esperantoklubb	100:-
Åke Palm, Malmö	100:-

Sinceran dankon al la donacintoj kaj al la
membroj de la diversaj "subtenkluboj"
(Klubo Cent, Klubo EC)! Sen via ekon-
omia subteno estus pli malfacile labori por
esperanto.

SEF